Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 7-an de decembro 2023 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 2-an de novembro 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Interna kaj alekstera informado

Norvega Esperantisto: Ni eldonos trian numeron en 2023, eĉ se ĝi estos maldika. Ni anoncu en tiu numero, ke nia ĉefa komunikmaniero kun la membroj ekde 2024 estos retaj novaĵleteroj.

Havigo de retpoŝtaj adresoj de membroj: Bård telefonis al Datatilsynet, kiu respondis al liaj demandoj rilate al kolekto kaj uzo de retpoŝtaj adresoj de la membroj. Surbaze de tiu respondo ni decidis jenon: Ni informos en Norvega Esperantisto 3/2023 pri la parta transiro al retaj novaĵleteroj ekde 2024. Al membroj, kies retpoŝtajn adresojn ni jam havas, ni sendos retmesaĝon demandante, ĉu ili volas ricevadi la novaĵleterojn al tiu adreso. Al tiuj, kies retpoŝtajn adresojn ni ne havas, ni unufoje sendos sms, petante retadreson, al kiu ni sendu la novaĵleteron, se ili deziras.

Jardar starigos novan adreson, per kiu ni dissendados la retajn novaĵleterojn.

4. Telefono en Esperantonia. Ni opinias, ke NEL ne nepre bezonas oficejan telefonon nun. En Norvega Esperantisto 3/2023 aperu la numero de Douglas. Ni petos al Herman agordi la telefonon ĝis optimala funkciado. Bård esploros la eblecon uzi elektronikan simkarton en telefonoj de estraranoj, por eventuala transiro al pli efika telefonsistemo.

5. Retpoŝto Ni ŝanĝos la sistemon de niaj «esperanto.no» - retadresoj tiel, ke ekde nun ĉiu tia adreso estu alirebla de ne nur unu persono. Tio sekurigos, ke neniu grava retletero perdiĝos dum periodoj, kiam iu ne povas prizorgi la envenantajn poŝtaĵojn.

6. Printempaj kursoj
Ni provos okazigi novajn, perkomputilajn Zoom-kursojn printempe 2024. Instruos Marianne. Bård aperigos informojn pri la kursoj en Facebook, simile kiel antaŭe.

7. Rezulto de membrointervjuoj
Prokrastita

8. Jarraporto 2023
Prokrastita

8. Eventualaĵoj
Neniu

9. Venonta estrara interkonsiliĝo:
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 11-an de januaro 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund